

Enhavo

1	Pasintaj konferencoj	2
1.1	“Ekonomiko, Lingva Justeco kaj Lingva Politiko” en Berlino (M. Gazzola)	2
1.2	Internacia Kolokvo en KCE pri vivanta lingvo kaj komunumo (S. Fiedler)	5
2	Simpozio en Vieno: “Eŭropo de la lingvoj en 1365” (Bernhard Tuidler)	6
3	El Universitatoj kaj Altlernejoj	7
3.1	Disertacioj doktorigaj	7
3.1.1	<i>Ian Rapley: Green Star Japan; Internationalism and Language [...]</i>	7
3.1.2	<i>Ana Velitchkova: Esperanto, civility, and the politics of fellowship [...]</i>	8
3.2	Diplomigaj laboraĵoj	8
3.2.1	<i>Antonella Strano: L’invenzione linguistica per la comunicazione [...]</i>	8
3.2.2.	<i>Claudie Demongeot: L’insertion sociale de jeunes en difficulté psychique</i>	8
3.3	Universitata novaĵletero el Amsterdam	8
3.4	Lingva diverseco kaj Esperanto dum Festivalo en Poznano (Ilona Koutny)	9
4	Premio Mauro la Torre	9
5	Jubileoj	10
5.1	<i>Erich-Dieter Krause</i> okaze de lia 80-jariĝo	10
5.1.1	Biografiaj informoj	10
5.1.2	Publikaĵoj – elekto	11
5.2	<i>Reinhard Haupenthal</i> okaze de lia 70-jariĝo	12
5.2.1	Biografiaj informoj	12
5.2.2.	Kelkaj gravaj eldonaĵoj	12
5.2.3	La bibliografio de la verkaro	13
6	Biografio de Jules <i>Meysmans</i>	14
7	La plan-lingva revuo <i>Lingua Internationale</i> kaj ĝia enhavo (R. Haupenthal)	16
8	Intervjuo kun la Cifal Volapŭka <i>Hermann Philipps</i> (Detlev Blanke)	18
9	<i>Ulrich Ammon</i> pri la germana lingvo en la mondo	22
10	Revuoj	24
10.1	<i>A’dam Multiling</i> – Multilingualism and Amsterdam	24
10.2	<i>Language Problems & Language Planning</i> , vol. 38 (2014)	24
11	Bibliografioj	26
11.1	La lingvoj de la mondo: <i>Glottolog.org</i>	26
11.2	Aktuala Bibliografio 6 (Detlev Blanke)	27
11.3	Leksika materialo <i>Glosbe</i> (Bernhard Pabst)	30
11.4	Bildvortaro de <i>Eichholz</i> en la reto	30
12	Materialoj de GDREA ĉe SAPMO (Detlev Blanke)	31

1 Pasintaj konferencoj

1.1 “Ekonomiko, Lingva Justeco kaj Lingva Politiko” en Berlino

La 2-an kaj 3-an de marto 2015 en Humboldt-Universitato de Berlino okazis kolokvo sub la temo “Ekonomiko, Lingva Justeco kaj Lingva Politiko”.

Temo kaj celgrupo

La celo de la Simpozio estis kunvenigi fakulojn el malsamaj fakaj tradicioj kaj aliroj por diskuti la sociajn kaj ekonomiajn efikojn de lingvaj politikoj, la efikon de lingva evoluo kaj lingva planado al justeco kaj malegaleco je la internacia kaj nacia niveloj, kaj la rilaton inter la demokrata decida procedo kaj lingva diverseco.

La celgrupo de la simpozio estis ekonomikistoj, filozofoj, socilingvistoj, respondeculoj pri lingva politiko kaj juristoj.

La ĝeneralaj temoj, kiujn la organizintoj indikis, estis:

- 1 Teoriaj modeloj de lingva justeco kaj lingva demokratio.
- 2 Taksado de la sociaj kaj ekonomiaj efikoj de lingva diverseco, lingva politiko kaj lingva evoluo.
- 3 Mezurado de la kostoj, avantaĝoj kaj distribuaj efikoj de lingvaj politikoj.
- 4 Lingvoj, lingvaj rajtoj kaj povo.
- 5 Multlingveco en la ekonomia vivo.

La kunveno do intence estis interfaka, ĉar la kompreno de la efiko de lingva evoluo kaj lingva politiko al la bonfarto kaj vivkondiĉoj de la homoj necesas multfakan aliron.

Organizintoj kaj subtenintoj

La Simpozio estis organizita de esplorgrupo pri ekonomiko kaj lingvoj de la Humboldt-Universitato en Berlino. Anoj de la grupo estas *prof-o d-ro Bengt-Arne Wickström* (gvidanto), *d-ro Michele Gazzola* kaj *s-ro Torsten Templin*. Temas pri interfaka esplorgrupo asociita al la Fakultato pri ekonomiko kaj entreprena administrado de la Humboldt-Universitato en Berlino aŭ al la Fakultato pri la sciencoj de kulturo, socio kaj edukado de la sama universitato.

Malavare finance subtenis la Simpozion (i) *Esperantic Studies Foundation* per la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), (ii) la *Societo pri Ekonomiko* de la Humboldt-Universitato de Berlino (germane “Wirtschaftswissenschaftliche Gesellschaft” – WWG), kaj (iii) la *Fakultato pri la sciencoj de kulturo, socio kaj edukado* de la Humboldt-Universitato en Berlino. La organizintoj kore dankas la subtenintojn.

Partoprenintoj

Krom la tri organizintoj, partoprenis 46 homoj el 15 malsamaj landoj. Temas efektive pri partoprenintoj el pluraj fakoj, inkluzive ekonomiko, aplika lingvistiko, politikaj sciencoj, filozofio kaj homoj laborantaj en organizaĵoj kiuj prilaboras lingvajn politikojn.

La invititaj prelegantoj estis *prof-o d-ro David Robichaud* el la Fakultato pri filozofio de la Universitato de Otavo, Kanado, kaj *prof-o d-ro Jean-Claude Barbier* el la Centro pri ekonomikaj studoj de la Universitato Sorbono de Parizo.

Programo

La programo konsistis el du ĝeneralaj kaj 29 individuaj prelegoj organizitaj laŭ du paralelaj sesioj. Jen la listo:

Ĝeneralaj prelegoj

- 1 *David Robichaud*: “Linguistic Freedom without Linguistic Free-Riding”
- 2 *Jean-Claude Barbier*: “The Myth of English Language Competence in Europe and some of its Consequences”

Individuaj prelegoj

- 1 *John Edwards*: “The Power of Language, the Language of Power”
- 2 *Astrid von Busekist* kaj *Benjamin Boudou*: “Language and Immigration: What can be Expected from Newcomers”
- 3 *Ramon Caminal* kaj *Antonio di Paolo*: “Your Language or Mine?”
- 4 *Katalin Buzasi* kaj *Peter Foldvari*: “Languages, Human Capital and Wellbeing in Sub-Saharan Africa”
- 5 *Vittorio Dell’Aquila*, *Federico Gobbo* kaj *Gabriele Innàccaro*: “The Assessment of Sociolinguistic Justice: Parameters and Models of Analysis”
- 6 *Andrew Shorten*: “A Capabilities Approach to the Measurement and Assessment of Linguistic Disadvantage”
- 7 *Till Burckhardt*: “Linguistic Justice on the European Labour Market: Assessing the Freedom of Movement through a Capabilities Approach”
- 8 *Sonja Novak Lukanovič*, *Mojca Medvešek* kaj *David Limon*: “The Impact of Economy on Bilingualism: The Case of Ethnically Mixed Area in Prekmurje”
- 9 *Antonio di Paolo* and *Lorenzo Cappellari*: “Bilingual Schooling and Earnings: Evidence from a Language-in-Education Reform”
- 10 *Carla Bagna*, *Monica Barni* kaj *Sabrina Machetti*: “Language Policies for Migrants in Italy: Tension between Democracy, Decision-Making and Linguistic Diversity”
- 11 *Adil Ishag*: “Linguistic Rights and Language Policies in Sudan with Special Reference to Post-Arabisation”
- 12 *Anuradha Kanniganti*: “Multilingual Economies and the Political Economy of Language: The Case of India”
- 13 *Konstantin Zamyatin*: “‘Maintaining and Developing the Languages’: Participation in Decision-Making and Support for Language Revival in Russia’s Finno-Ugric Republics”

- 14 *Ana Kedveš*: “Hammers, Tears and the Constitution: Discursive Legitimation Strategies in Anti-Cyrillic Protests in Croatia”
- 15 *Marianne Blattès*: “The Discourse of English as a Language for ‘Socio-Economic Development’: Risks and Consequences”
- 16 *Denis Kadochnikov*: “Languages, Regional Conflicts and Economic Development: Russia’s Historical Case”
- 17 *Abdallah H. Al-Kahtany*: “Indigenous Literacies and Postcolonial Impact”
- 18 *Janne Väistö*: “Development of Nationalism and Language Policy: Mandatory Swedish Language Study in Finland”
- 19 *Zsombor Csata kaj László Marác*: “New Positions and Opportunities for the Hungarian Minority in Romania’s Transylvania: Institutional-Linguistic and Economic Perspectives”
- 20 *Reine Meylaerts*: “Language and Translation Policies in Context of Urban Superdiversity”
- 21 *Carsten Quell*: “Fairness, Efficiency and Accountability in Language Policy Regimes vs. Language Policy Implementation – a Practitioner’s Perspective”
- 22 *Cyril Brosch*: “Muttersprachler und Lingua-Franca-Kommunikation – ein Vergleich zwischen Englisch und Esperanto”
- 23 *Javier Alcalde*: “Linguistic Justice in the League of Nations”
- 24 *Dietrich Voslamber*: “How Choosing Working Languages in a Multilingual Organization?”
- 25 *Ilaria Driussi*: “Language between Hard and Soft Power”
- 26 *Carmen Álvarez-García*: “Handling Multilingualism in Internationalization Management: A Study on Export Firms in Andalusia (Spain)”
- 27 *Tobias Schroedler*: “Recent Socio-Economic Developments in Ireland and their Implications for the Language Policy Debate”
- 28 *François Nemo*: “Denying Linguistic Rights: From Prejudice and Denigration to Corrective Recognition”
- 29 *Rubén Fernández Asensio*: “Language policies in the Kingdom of Hawai‘i: Reassessing Linguicism”

La detaloj pri la prelegintoj, ilia reta adreso kaj la resumoj de ĉiuj prelegoj estas publike haveblaj en la oficiala programo de la Simpozio, kiu estas publikigita ĉe: www.wiwi.hu-berlin.de/justice

La programo inkludis du ĝeneralajn prezentojn pri la nuna esploro de la grupo REAL.

- (1) *Michele Gazzola* prelegis pri la projekto “LAPO” (“Lingva justeco kaj lingva politiko en Eŭropa Unio”), finance subtenita de la svisa scienca fondaĵo inter novembro 2011

kaj aprilo 2013 kaj de Eŭropa Unio inter majo 2013 kaj aprilo 2015. Rezultoj de la projekto LAPO estas parte haveblaj en Esperanto en la artikolo “Lingva justeco: kiel taksu ĝin? La ekzemplo de Eŭropa Unio”, en Vergara, José-Antonio (red.), Aktoj de la 67a Sesio de la Internacia Kongresa Universitato. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, pp. 74-89, (2014). Pli da informoj pri la projekto oni povas trovi ĉe http://www.michelegazzola.com/lapo_en.html

- (2) *Torsten Templin* prezentis la esploran agadon de la grupo REAL ene de la eŭropa projekto MIME (“Movebleco kaj inkluziveco en multlingva Eŭropo”). *Prof-o d-ro François Grin* (Universitato de Ĝenevo, Svislando), kiu estas la kunordiganto de la projekto, donis ĝeneralan enkondukon al MIME. Temas pri esplorprojekto pri multlingveco en Eŭropo, financata per la 7-a Kadra Programo de la Eŭropa Komisiono, al kiu partoprenas 22 sciencaj organizaĵoj el 16 eŭropaj landoj. Uzante novigan interdisciplinan aliron, MIME generos kompleksan aron da politike gravaj proponoj determinantaj la prilingvajn politikojn kaj strategiojn, kiuj plej bone kunigas ‘moveblecon’ kaj ‘inkluzivecon’. La projekto komenciĝis en marto 2014 kaj daŭros ĝis aŭgusto 2018. Pli da informoj ĉe www.mime-project.org.

Dum la ĝenerala parto de la programo, *Bengt-Arne Wickström* prezentis la agadon kaj la celojn de *Esperantic Studies Foundation* kaj de la *Societo pri Ekonomiko* de la Universitato Humboldt de Berlino.

Lingva reĝimo

La kunveno estis multlingva.

Oni akceptis prelegproponojn en la sekvaj lingvoj: angla, Esperanto, franca, germana, hispana kaj itala. La angla lingvo estis la ĉefa laborlingvo de la Simpozio sed oni rajtis prelegi ankaŭ en la aliaj lingvoj, kondiĉe ke oni provizu diapozitivojn en la angla.

Tiu ĉi multlingva trajto hodiaŭ tute ne plu estas kutima en internaciaj konferencoj. La plej granda parto de la partoprenintoj elektis la anglan kiel laborlingvon.

Tamen, unu prelego okazis en la germana kaj unu en Esperanto. Esperanto-parolantoj estis proksimume 15% de la partoprenintaro.

Redaktis: *Michele Gazzola*

1.2 Internacia Kolokvo en KCE pri vivantaj lingvo kaj komunumo

De la 27-a de februaro ĝis la 2-a de marto 2015 en la Kultura Centro Esperantista in La Chaux-de-Fonds (Svislando) okazis internacia kolokvo kun la titolo „Vivanta lingvo de vivanta komunumo“.

La programo enhavis la sekvajn prelegojn:

Christer Kiselman:

La lingvoj de Zamenhof 1878-2015: rapida trarigardo de rapida lingva evoluo

Giorgio Silfer

Kio estas lingvo, laŭ diversaj kaj diverĝaj lingvopolitikoj en la nuna Esperantio

Carlo Minnaja

Poeto kun popolo: ho animleva scio!

Sabine Fiedler

Frazeologio kiel pruvo de esprimriĉeco kaj viveco: la ekzemplo de Esperanto

György Nanovfszky

La socilingvistika situacio en Indonezio: ĉu vivanta planlingvo de naciŝtata komunumo?

Zlatoje Martinov

Niaj retgazetoj: reala lingvo kaj virtuala komunumo?

Giorgio Silfer

Kion postuli por esperanta lingvotestado?

La prelegoj aperos en la revuo „Literatura Foiro“. La kolokvo estis karakterizata de interesaj kaj altnivelaj diskutoj kaj donis eblecon por pensigaj interparoladoj dum paŭzoj pri esperantologiaj kaj aliaj temoj. Krome estis kulinaraj kulminoj kaj vizitoj de la fame konata Internacia Horloĝa Muzeo en La Chaux-de-Fonds kaj de la plej bela framasona loĝio en Svislando. *Claude Gacond* gvidis tra la *Centro pri Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia / Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale (CDELI)* en la Urba Biblioteko.

Sabine Fiedler

2 Simpozio en Vieno: “Eŭropo de la lingvoj en 1365”

Okaze de la jubilea jaro de la Universitato de Vieno oni planas ellabori plurfoje tavoligitan mapon, kiu dokumentu la lingvan multecon, kiu regis en Eŭropo en la fondoĵaro de la Universitato de Vieno. Lige al tio oni ne nur procedos laŭ pure geografiaj vidpunktoj sed klopodos videbligi ankaŭ la kompleksan multecon de lingvoj, la situaciojn de plurlingvecoj kaj lingvaj kontaktoj, kiuj jam karakterizis la malfruan mezepokan Eŭropon.

Kadre de la solenaĵo okaze de la 650-jariĝo de la Universitato la projekto estu prezentata publikeco-efike dum septembro 2015. Por tio oni invitos internaciajn ekspertojn. Kadre de simpozio oni traktos problemojn de la historia esplorado de la eŭropa lingva pejzago, inter alie jenajn demandojn:

Kiel ni povus esplori la socian dinamikon kaj la reciprokajn rilatojn inter la lingvoj de la 14-a jarcento?

Kion ni povus scii, kiel ni povis ion ekscii, pri tiuj lingvoj, kiuj ankoraŭ vivis dum la 14-a jarcento sed nuntempe estas malmulte dokumentitaj aŭ de kiuj nur spuroj (substratoj) konserviĝis en la nuntempe parolataj lingvoj?

Kiel formiĝas nia bildo pri la kontinueco kaj ŝanĝiĝo en la lingvo-historio? Kiel oni periodigas la historion de lingvoj en fruaj, malfruaj, mezaj, tre malfruaj ktp. epokoj?

Dato: Septembro 18-19, 2015

Loko: Universitato de Vieno, prelegejo de anglistiko (<http://anglistik.univie.ac.at/>), sur la universitata „campus“ (<http://campus.univie.ac.at/>, korto 8)

Pliaj informoj: <http://linguae1365.univie.ac.at/>

(Laŭ informoj de *Bernhard Tuidler*)

3 El Universitatoj kaj Altlernejoj

Antaŭrimarko: Ne ekzistas klara internacia normo pri studo-finaj universitataj titoloj.

En multaj landoj, laŭ usona modelo, post almenaŭ 2-3-jara studo oni povas fariĝi *Bakalaŭro* (Bachelor, BA).

Post almenaŭ 5-jara studo oni ricevas la titolon de “*Diplomito* pri la fako x” (ekz. Dipl.-Inĝ.), aŭ “*Master*” (MA, aŭ “*Magister*”, Mgr). En kelkaj landoj post tia studado oni fariĝas “*Doktoro*” (ofte nomata “malgranda doktoro”, aparte se temas pri juro aŭ medicino, en Italio ekz. *Dott.*).

Pli kaj pli internacie disvastiĝas la kutimo – kvankam apenaŭ en Germanio – , ke “doktoro” estu komparebla al la angla *PhD* (en kelkaj orienteŭropaj landoj siatempe “kandidato de scienco”, ruse *'kandidat nauk'*), kiu post fino de almenaŭ 5-jara studado postulas apartan seriozan kaj defendendan disertacion. Disertacioj doktorigaj do ofte rilatas al tiu “PhD-doktoreco”.

Nur en kelkaj mezeŭropaj landoj, inter alie en Germanio kaj Pollando oni konas la habilitacian doktorecon (doctor habilitatus, *Dr. habil.*; aŭ doctor scientiae, *Dr. sc.*), kiun oni ricevas post defendo de dua disertacio kaj kiu ebligas ricevi la profesornivelan instrurajton (*Facultas docendi* aŭ *Venia legendi*). Tiu dua doktoreco krome estas kondiĉo por esti nomumota universitata profesoro (en Germanio: eksterordinara, honoraria, orda profesoroj).

3.1 Disertacioj doktorigaj

3.1.1 *Ian Rapley: Green Star Japan: Internationalism and Language...*

Rapley, Ian (2013): *Green Star Japan: Internationalism and Language in the Japanese Esperanto-Movement, 1906-1944*. Oxford. University of Oxford, Pembroke College, 273 p.

Abstract

The planned language Esperanto achieved popularity in early twentieth century Japan, inspiring a national movement which was the largest outside Europe. Esperanto was designed to facilitate greater international and inter-cultural communication and understanding; the history of the language in Japan reveals a rich tradition of internationalism in Japan, stretching from the beginnings of the movement, in the wake of the Russo-Japanese war, through the end of the Pacific war, when, for a brief period, organised Esperanto in Japan ceased.

Building upon existing studies of internationalism amongst elite opinion makers in Japan, this history of Esperanto reveals unexpected examples of internationalism amongst the broader Japanese public, a number of competing conceptions of the international world, and their realisation through a range of transnational activities.

Esperanto was at once an intellectual phenomenon, and a language which could be put into immediate and concrete practice.

The diversity of social groups and intellectual positions within the Japanese Esperanto community reveals internationalism and cosmopolitanism, not as well defined, static concepts, but as broad spaces in which different ideas of the world and the community of mankind could be debated.

What linked the various different groups and individuals drawn into the Japanese Esperanto movement was a shared desire to make contact with, and help to reform, the world beyond

Japan's borders, as well as a shared realisation of the vital role of language in making this contact possible.

From radical socialists to conservative academics, and from Japanese diplomats at the League of Nations to members of rural communities in the deep north of Japan, although their politics often differed, Japanese Esperantists came together to participate in the re-imagining of the modern world; in doing so they became part of a transnational community, one which reveals insights into both modern Japanese history, and the nature of internationalism.

3.1.2 Ana Velitchkova: Esperanto, civility, and the politics of fellowship

Velitchkova, Ana (2014): *Esperanto, civility, and the politics of fellowship. A cosmopolitan movement from the eastern european periphery*. Notre Dame (Indiana/US), Graduate Program in Peace Studies and Sociology, Gvidanto: Omar Lizardo, 161 p.

3.2 Diplomigaj laboraĵoj

3.2.1 Antonella Strano: L'invenzione linguistica per la comunicazione internazionale ...

Strano, Antonella (2013/14): *L'invenzione linguistica per la comunicazione internazionale e l'Esperanto*. Palermo: Università degli studi di Palermo, Facoltà di lettere e filosofia. Gvidantino: Luisa Brucale, 63 S.

(Pri italaj interlingvistikaj studofinaj disertacioj vidu:

Astori, Davide (2014, Red.): *La Premio „G. Canuto“ por magistriĝa disertacio pri Interlingvistiko kaj Esperantologio*. Milano: Itala Esperanto-Federacio, 223 p.

3.2.2 Claudie Demongeot: L'insertion sociale de jeunes en difficulté psychique...

Demongeot, Claudie (2003): *L'insertion sociale de jeunes en difficulté psychique au moyen de l'Espéranto*. Nancy: Université Nancy 2, Institut Régional du travail. Gvidantoj: Henri Oldache, Thierry Choffat, Thierry Saladin.

La kompletan tekston oni trovas ĉe: <http://mulhouse.esperanto.free.fr/claudy/memuaro.htm>

3.3 Universitata novaĵletero el Amsterdam

Kiel konate *prof. Federico Gobbo* komence de 2014 transprenis de *prof. Wim Jansen* la katedron Interlingvistiko/Esperanto en la Universitato de Amsterdam. Federico Gobbo daŭrigas la bonan tradicion de novaĵletero pri la agado de la katedro, kiun komencis *prof. Jansen*. Jansen ĝin redaktis ĝis n-ro 23.

Kiu volas sekvi la evoluon de la agado de la katedro povus ricevi la PDF-version de la novaĵletero "La Katedro" de federico.gobbo@gmail.com.

La 13-an de marto 2015 *prof. Gobbo* prezentis sian solenan enkondukan prelegon en la universitato:

Interlinguïstiek, een vak voor meertaligheid (Interlingvistiko – fako por plurlingveco).

3.4 Lingva diverseco kaj Esperanto dum Festivalo en Poznano

La *Festivalo de Sciencoj kaj Artoj* estas kutima printempa aranĝo, kie universitataj fakoj prezentas allogan programon por la interesiĝantoj, ĉefe por mezlernejoj. La teamo de la **Interlingvistikaj Studoj de UAM** (*Michael Farris kaj Ilona Koutny* kun du doktoriĝantoj *Ida Stria kaj Michael Kozicki* kaj ĉina koleginino *Chung-Yi Wang*) per sia programo “*Kiel venki lingvajn barojn*” altiris elstare multajn partoprenantojn (50 gelernantojn kun siaj instruistoj).

Post mallonga prelego pri lingva diverseco okazis konkurso pri lingvoj, konciza prezento de Esperanto, ankaŭ per poemo kaj muziko. La retejo *Lingvo.info* kaj la broŝuro *Malkovru Esperanton* estis proponataj por pluaj informoj, la partoprenantoj kontente foriris kun informiloj kaj skribiloj de *lingvo.info*.

Ilona Koutny, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

4 Premio Mauro La Torre

Kvankam la limdatoj por partopreni la konkurson por 2015 jam longe pasis, ni tamen informas pri la konkurso, ĉar ĝi okazos ĉiujn duan jaron. Do, la sekva konkurso okazos en 2017. *Red.*

La *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)*, kunlabore kun la *Familio La Torre* anoncis konkurson pri esplor-laboro en unu el la kampoj, en kiuj laboris la karmemora prezidanto de ILEI Mauro La Torre (1946-2010)

Vidu la prezenton pri li ĉe: <http://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=10>.

En 2011 la Komitato de ILEI elektis *Profesoron Mauro La Torre* Honora Membro.

La esplor-kampoj por la konkurso estas jenaj

- Aplikoj de lingvoteknologio al Esperanto kun rezultaj vortaroj aŭ pli ĝeneralaj lingvosciencaj pritraktoj
- Interkultura edukado per Esperanto
- Instruado de Esperanto kaj iloj por instrui Esperanton
- Perfektigaj kursoj por instruantoj de Esperanto
- Retaj kursoj pri Esperanto
- Evoluo de la vortrezoro de Esperanto tratempe kaj nuntempe

La kandidato devos anonci sian intencon partopreni kaj sian temon ĝis la unua de Januaro 2017.

La ILEI estraro kaj la familio La Torre tiam starigos juĝ-komisionon en rilato kun la temo de la esplor-laboro. La esplor-laboro devas esti dokumentita kaj priskribita en raporto de almenaŭ 20 A4-paĝoj, maksimume 30 paĝoj.

La laboraĵo estu transdonita en reta formo al ilei.prezidanto@gmail.com ĝis la 30-a de Aprilo 2017 por la dua okazigo de la konkurso, kaj en papera formo po unu ekzemplero al la familio La Torre, al ILEI kaj al la ĵurio (la kandidato ricevos la stratadresojn de la ricevontoj) (entute kvin ekzempleroj). La anonco pri la gajninto okazos antaŭ la 30-a de Junio 2017.

La gajninto devos sendi ok paperajn ekzemplerojn de sia laboraĵo, tio estas po unu, al diversaj gravaj bibliotekoj en la mondo laŭ la programo de ILEI “Ni Savu Niajn Semojn”.

La premio konsistas el sumo de 500 EUR.

ILEI retenas al si la rajton eventuale aperigi la gajnintan raporton.

La premio estos transdonita la unuan fojon en la jaro 2015 okaze de la 48-a ILEI-Konferenco en Oostende, Belgio, kaj anoncita dum la 100-a Universala Kongreso de UEA en Lille, Francujo.

La konkurso okazos poste ĉiun duan jaron. En ĉiu konkursjaro la premio estos transdonita en la tiujara konferenco de ILEI kaj pli vaste prezentita en la samjara Universala Kongreso de UEA.

Ekzistas interna regularo inter ILEI kaj la familio La Torre pri la starigo, konsisto kaj laboro de la ĵurio. *Mireille Grosjean*, prezidanto de ILEI

5 Jubileoj

5.1 *Erich-Dieter Krause* okaze de lia 80-jariĝo

Prof. Dr. habil. Erich-Dieter Krause la 12-an de aprilo 2015 festis sian 80-an naskiĝtagon, okaze de tio IPI postdate kaj kore gratulas kaj publikigas kelkajn informojn pri la jubileulo.

Prof. Krause apartenas al la gvidaj specialistoj en Germanio pri la indonezia lingvo. Krom tio, kiel konate, li verkis la plej bonajn kaj plej ampleksajn Esperanto-vortarojn por germanoj.

5.1.1 Biografiaj informoj

Erich-Dieter Krause naskiĝis la 12-an de aprilo 1935 en la saksa urbo Auerbach/Germanio. Post la studo de sinologio kaj indoneziistiko en la Orientazia Instituto de la Universitato de Leipzig li aldonis plurjaran studadon de biblioteko-scienco en Humboldt-Universitato de (orienta) Berlino.

De 1960-1962 li laboris kiel tradukisto kaj interpretisto por la angla en la Unio de Burmo (nuntempe: Respubliko de la Unio de Myanmar). Post tiu laboro sekvis lia okupo kiel tradukisto kaj interpretisto en la Respubliko de Indonezio (1965-1968).

De 1968-1979 li laboris kiel fakulo pri aziaj sciencoj en la Universitata Biblioteko de Leipzig (de 1977-1979 kiel vicdirektoro de la biblioteko).

Lia scienca kariero komenciĝis en 1974 per la defendo de 406-paĝa doktora disertaĵo pri fremdaj influoj al la leksiko de la indonezia lingvo (Bahasa Indonesia), kun aparta atento al la angla-usona influo (Friedrich-Schiller-Universitato Jena). Ekde 1979 li estis scienca supera asistanto en la Universitato de Leipzig por la fako indoneziistiko, instruado kaj esplorado, kie post habilitacio en 1992 li estis nomumita profesoro por la samaj fakoj.

Se temas pri liaj sinengaĝoj en la medio de Esperanto, menciindas lia aktivado kiel studento dum la 1950-aj jaroj, kiuj altiris multajn junulojn, kiuj poste en GDREA ludis gravan rolon. Prof. Krause ankaŭ estis membro de la Centra Estraro de GDREA.

En 1986 li elektiĝis membro de la Akademio de Esperanto kaj en 1998 membro de la redakta komitato de la revuo *Esperantologio/ Esperanto Studies*.

5.1.2 Publikigaĵoj – elekto

La ĉefaj publikigaĵoj de Erich-Dieter Krause (monografiaj) troviĝas sur la kampo de leksikografio (indonezia lingvo kaj Esperanto) kaj instruado (indonezia lingvo).

Taschenwörterbuch Esperanto-Deutsch. Leipzig: Verlag Enzyklopädie 1967. 190 p. (5 eldonoj). (malgranda vortaro, t.n. ‚poŝvortaro‘)

Deutsch-Indonesisches Gesprächsbuch. Leipzig: Verlag Enzyklopädie 1970. 231 p. (Post la ortografia reformo de la indonezia lingvo la libro estis prilaborita kaj aperis en 1983 sub la titolo *Gesprächsbuch Deutsch-Indonesisch. Buku Percakapan Jerman-Indonesia.* 214 p., dua eldono 1987, funde prilaborita eldono en 2003 ĉe Buske, Hamburgo (germana-indonezia konversacia libro)

Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto. Leipzig: Verlag Enzyklopädie 1971. 279 p. (La kvara korektita eldono en 1989) (malgranda vortaro, t.n. ‚poŝvortaro‘).

Lehrbuch der indonesischen Sprache. Leipzig: Verlag Enzyklopädie 1978. 367 p. (ses eldonoj, la sesa en 2004 ĉe Buske, Hamburg, 404 p.) (germana lernolibro por la indonezia lingvo)

Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Leipzig: Verlag Enzyklopädie 1983 kaj München: Langenscheidt/Verlag Enzyklopädie 1993. 596 S. [40.000 kapvortoj kaj parolturnoj]

Wörterbuch Indonesisch-Deutsch. Leipzig: Verlag Enzyklopädie 1985. 492 p. [47.500 kapvortoj kaj parolturnoj] (12-a eldono en Leipzig 1990; 2 licencitaj eldonoj en Munkeno ĉe Langenscheidt; krome licencitaj eldonoj por Indonezio en Jakarta, eldonejo Dian Rakyat 1991 kaj 1994.)

Kompaktwörterbuch Esperanto. Esperanto-Deutsch. Deutsch-Esperanto. 469 S. Leipzig, Berlin: Langenscheidt/Verlag Enzyklopädie 1995 (kunbindaĵoj de la du poŝvortaroj).

Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch. XVII, 882 S. [80.000 kapvortoj kaj parolturnoj] Hamburg: Buske 1999.

Großes Wörterbuch Deutsch-Indonesisch. XI, 1057 S. [100.000 kapvortoj kaj parolturnoj] Hamburg: Buske 2002.

Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto. XVII, 1679 S. [160.000 kapvortoj kaj parolturnoj] Hamburg: Buske 2007.

Großes Wörterbuch Indonesisch-Deutsch. XIV, 742 S. [72.500 kapvortoj kaj parolturnoj] Hamburg: Buske 2010.

Prof. Krause krom tio verkis diversajn studojn en fakaj revuoj kaj esperantistaj periodaĵoj, krome vojaĝraportojn, recenzojn kaj ekspertizojn. Li kunlaboris pri germana lernolibro por Esperanto (pri la leksikografia parto).

Li faris diversajn prelegojn, i.a. kadre de la 14-a Internacia Kongreso de Lingvistoj 1987 en Berlino, krome kadre de diversaj konferencoj de la germana Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik e.V.). Pri problemoj de la leksikografio de Esperanto li prelegis i.a. dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto en Varsovio, Roterdamo kaj Brighton, krome en konferencoj en Szczecin kaj Tatraska Lomnica.

5.2 Reinhard Haupenthal okaze de lia 70-jariĝo

Okaze de la 70-jariĝo de la interlingvisto *Reinhard Haupenthal* IntI postdate gratulas kaj publikigas kelkajn informojn pri la jubileulo.

5.2.1 Biografiaj informoj

Reinhard Haupenthal naskiĝis la 17-an de februaro 1945 en Kronach/Germanio.

En la Universitato de la germanfederacia Sarlando en Saarbrücken li studis germanan filologion, katolikan teologion, filozofion, pedagogion kaj historion. De 1969 ĝis 1993 li laboris en diversaj gimnazioj kiel *fakinstruisto* (laste kiel supera studkonsilisto) ‚Oberstudienrat‘). Post tio pro laborakcidento li pensiuliĝis.

Al la postenoj en la esperanta lingvo-komunumo apartenas lia funkcio de *ĉefdelegito de UEA* por Germanio (siatempe por FRG), *afergvidanto de Sarlanda Esperanto-Ligo* kaj redaktoro de la revuo *Dialogo* (1973-1988). Li estis membro de *Akademio de Esperanto* (1976-1998), kunlaboranto de *Iltis-Eldonejo* kaj redaktoro de la revuo *Iltis-Forumo* (1989-1995).

Li krome estis membrofondinto de *Prelato-Schleyer-Komitato* (2001-2008), kaj de la *Societo Kálmán-Kalocsay* (1991-2008).

Reinhard Haupenthal krome estis *instrukomisiito por esperantologio kaj interlingvistiko* ĉe la Universitato de Sarlando, Saarbrücken (1968-1994). 1968-1988 li fondis kaj gvidis la *eldonejon Artur E. Iltis*. En tiu ĉi eldonejo kaj en la eldonejo *Edition Iltis*, gvidata de lia edzino *Irmi Haupenthal* ekde 1997 kun sidejo en Bad Bellingen, aperis la plej multaj publikaĵoj de la jubileulo.

Ekde 1999 li vivas en la Provenco/Francio kaj ekde 2009 krome en Bad Bellingen (Markgräflerland, Suda Badeno/Germanio)

Reinhard Haupenthal sendube apartenas al la plej gravaj kaj plej produktivaj interlingvistoj de la nuntempo. Li ne nur aŭtoris grandan nombron da studoj sed ankaŭ zorgis pri eldono aŭ represo de multaj grandparte nekonataj aŭ longe elĉerpitaj tekstoj, aparte pri Volapuko, tiel redisponebligante ilin al esploraj celoj. Por multaj reeldonaĵoj li verkis enkondukojn, postrimarkojn aŭ bibliografiajn aldonojn. Kune kun sia edzino li fondis la tradicion de festlibroj en Esperanto, editante ilin ĝis nun por jenaj personoj: *André Albault* [2000], *Adolf Burkhardt* [2004], *Fernando Diego* [2003], *Claude Gacond* [2011], *Reinhard Haupenthal* [1998] kaj *Gaston Waringhien* [1985]).

Haupenthal ankaŭ konatiĝis kiel tradukanto de germana beletro, i.a. per verkoj de *Gottfried August Bürger*, *Adalbert Chamisso*, *Joseph von Eichendorff*, *Heinrich Heine*, *Franz Kafka*, *Gottlieb Klopstock*, *Eduard Mörike*). Li estas aŭtoro de multaj recenzoj, kies enhavon diversaj recenzitoj tamen ne ĉiam volis akcepti.

La ege riĉa *interlingvistika biblioteko de familio Haupenthal* laŭkontrakte iom post iom iros donace al la la Bavaria Ŝtata Biblioteko en Munkeno kaj tie estos deponata kiel corpus separatum (vd. IpI 21[2012] n-ro 81, p. 2-4).

5.2.2 Kelkaj gravaj eldonaĵoj

Red. = redaktis, editis; Repr. = represaĵo, reeldono

(1968): *Enkonduko en la libroskiencon de Esperanto. Bibliografia gvidilo kun komentario*. Nürnberg: Pickel, 44 p.

(Red./Repr. 1929/1973): *Petr E. Stojan. Bibliografio de Internacia Lingvo*. Kun bibliografia aldono de Reinhard Haupenthal. Hildesheim – New York: Olms, 561 p.

(Red. 1976): *Plansprachen. Beiträge zur Interlinguistik*. Mit einer Auswahlbibliographie zur Interlinguistik von Reinhard Haupenthal. Darmstadt: Wiss. Buchgesellschaft, 365 p.

(Red. 1978): *Eugen Wüster. Esperantologiaj studoj*. Antverpeno – La Laguna: TK, Stafeto 254 p.

(kun Tazio Carlevaro, 1999): *Bibliografio di Ido*. Bellinzona: Hans Dubois/Saarbrücken: Iltis, 193 p.

(2010): *Iltis – Ein Verlag, seine Geschichte, seine Werke / Eldonejo, ĝia historio, ĝiaj verkoj*. Bad Bellingen: Iltis, 74 p.

(1982): *Volapük-Bibliographie*. Hildesheim – Zürich – New York: Olms, 124 p.

(Red./Repr. 1988): *La Esperantisto. Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto 1889-1895*. Kun postparolo de Reinhard Haupenthal. Hildesheim – Zürich – New York: Olms.

(Red./Repr. 2000): *Rund um die Welt. Zeitschrift für Volapükisten und solche, die es werden wollen 1888-1892*. Hildesheim – Zürich – New York: Olms (kun germana postparolo de Reinhard Haupenthal)

(Red./Repr. de la originalaj eldonoj 1903 kaj 1907/1979 + 2001): *Louis Couturat/Léopold Leau. Histoire de la langue universelle. Beigebunden Les nouvelles langues internationales*. Kun bibliografia postparolo (germana – franca) de Reinhard Haupenthal. Hildesheim-Zürich-New York: Olms (unua represo 1979), XXX+574+110+8 p.

(Red. kun Irmi Haupenthal 2008): *Prälat-Schleyer-Jahrbuch 2008*. Saarbrücken: Edition Iltis, 237 p.

(kun Irmi Haupenthal 2013): *Auswahlbibliographie zur Interlinguistik und Esperantologie. Selektita Bibliografio pri Interlingvistiko kaj Esperantologio*. Bad Bellingen: Edition Iltis, 60 p.

(2015): *Einblicke. Rezensionen zur Esperantologie und Interlinguistik*. (germanaj recenzoj) edita de Hervé Vallon. Bad Bellingen: Edition Iltis, 2015, 117 p.

5.2.3 La bibliografio de la verkaro

Okaze de lia 70-jariĝo ankaŭ aperis la bibliografio de la verkaro de Reinhard Haupenthal:

Reinhard Haupenthal. Bibliographie seiner Veröffentlichungen zur Esperantologie und Interlinguistik. Zum 70. Geburtstag, 17. Februar 2015, bearbeitet von Hervé Vallon. Bad Bellingen: Edition Iltis, 2015, 157 S.

La bibliografio entenas prefacon de la editoro en la germana kaj Esperanto, listo de biografiaj informoj, interparolo kun Hermann Holzhauser, bibliografio pri Haupenthal kaj ties biblioteko. Sekvas 1015 bibliografieroj kaj tri indeksoj (revuoj, recenzitaj verkoj, personoj).

La (ĝisnuna) kompleta verkaro de Haupenthal estas kasifikebla jene:

1. Bibliografiaj laboroj
2. Publikigaĵoj pri esperantologio
3. Publikigaĵoj pri interlingvistiko (ĉeftemo: Johann Martin Schleyer, Volapük)
4. Tradukoj de germana beletra en Esperanto
5. Editado/redaktado (antologioj, festlibroj)

La materialo estas ordigita kronologie. En la sama jaro aperas monografioj (propraj kaj tradukitaj).

6 Biografio de *Jules Meysmans*

En la interlingvistika scienco estas konate, ke la termino „interlingvistiko“ devenas de la belgo *Jules Meysmans*, kiu mem estis aktiva planlingvulo.

En la de li eldonita revuo „*Lingua Internationale*“ (Bruxelles, 1 [1911/12], Nr. 8:14-16; vidu ĉi-kajere) en sia artikolo „Une science nouvelle“, li direktis sin al lingvistoj kun jena propono: „Ni ŝatus scii, ĉu ne estus eble krei novan sciencon, kiu ekzemple povus nomiĝi „interlingvistiko“ kaj kiu povus esplori la naturajn leĝojn de la kreado de komunaj helpaj lingvoj“.¹

Intertempe la termino estas relative akceptita, kvankam kun diversaj difinoj de la objekto (vidu i.a. Detlev Blanke, *Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen*. Edita de Sabine Fiedler, Frankfurt/ Main ktp.: Peter Lang, 2006, p. 19-34).

Antaŭ nelonge *Reinhard Haupenthal* atentigis min pri manskribita biografio de *Jules Meysmans*, trovita en la postlasaĵo de *Giuseppe Peano* (1858-1932):

(http://www.comune.cuneo.gov.it/fileadmin/comune_cuneo/content/amm_organiz/cultura/centro_doc_territoriale/fondo_peano/cd/meysmans/01222_01.pdf).

La biografian teskton germanigis *Maria Merla* (vidu „*Interlinguistische Informationen*“ 23(2014) n-ro 91, p. 5-7). Nun sekvas la esperantlingva varianto. (Red.)

Curriculum vitae de Jules Meysmans (Bruxelles)

Meysmans, Jules, Direktoro de la Nacia Stenografia-Instituto de Bruselo:

Naskita la 14-an de majo 1870 en Jodoigne (Belgio) li finis instruigon en Collège de Tirlemont. En 1886 li partoprenas lernejan klerigon en la Ecole normale supérieure² kaj samtempe vizitis aranĝojn de la humanistika fakultato de Gaud; en 1890 li ricevas la diplomon de instruisto kun agregacio³ por instruado en mezgradaj lernejoj kaj tiun de doktoro de filozofio kaj humanistiko (kun plej alta distingo).

En la jaro 1890 li inventas sistemon de stenografio kaj por disvastigi ĝin li fondas nacian stenografi-instituton. Li organizas kursojn en la plej gravaj urboj de la lando kaj eldonas

¹ La germanan tradukon liveris Reinhard Haupenthal:

„Wir möchten wissen, ob es nicht möglich wäre, eine neue Wissenschaft zu schaffen, die sich z.B. *Interlinguistik* nennen würde und die die natürlichen Gesetze der Bildung gemeinsamer Hilfssprachen studieren würde“.

(citita laŭ R. Haupenthal in „*Plansprachen – Beiträge zur Interlinguistik*“, hrsg. von Reinhard Haupenthal, Darmstadt: Wissenschaftliche Buchgesellschaft 1976, p. 111.).

² Elita altlernejo por eduki instruistojn por gimnazioj.(Maria Merla = MM).

³ Ŝtata ekzameno por gimnaziaj instruistoj en formo de konkurso. La gajnintoj rajtas instrui en gimnazioj kaj altlernejoj kaj rajtas fariĝi ŝtataj oficistoj (MM).

revuon kaj multajn publikaĵojn gravajn pri stenografio. La *stenografia sistemo de Meysmans* nuntempe estas unu el la plej disvastigitaj en Belgio.

Kiel konvinkita adepto de internacia lingvo, al kiu li dediĉas sian tutan liberan tempon, en 1886 li lernas *Volapukon* kaj en 1890 fariĝis adepto de *Esperanto*, por kiu li organizis kursojn en Gaud kaj Bruselo. En 1907 li fariĝas adepto de *Idiom Neutral* kaj sekretario de la Groupe de la Langue Internationale, fondita de M. Bonto de Bijlevelt en Bruselo por la disvastigo de *Idiom Neutral*.

Adreso: J. Meysmans, rue Mareyde, 11, en Wohuve ĉe Bruselo/Belgio“ (elstarigoj miaj-Red.)

Curriculum vitae de J. Meysmans (Bruxelles)

Meysmans, Jules, directeur de l'Institut National de Sténographie de Bruxelles.

Né à Jodoigne (Belgique) le 14 mai 1870, il fait ses humanités au collège communal de Bierlemont. En 1886 il entre comme élève à l'École normale supérieure de Gand et suit en même temps les cours de la faculté de lettres de l'Université de Gand; en 1890 il obtient le diplôme de professeur-agrégé de l'enseignement moyen et celui de docteur en philosophie et lettres (avec la plus grande distinction).

Inventeur d'un système de Sténographie (1890), il fonde, pour le propager, l'Institut National de Sténographie, organise des cours dans les principales villes du pays, édite un journal et de nombreuses publications concernant la sténographie. Le système de sténographie Meysmans est actuellement un des plus répandus en Belgique.

Partisan convaincu de la langue internationale, à laquelle il consacre tous ses loisirs, il apprend le Volapük en 1886, adhère en 1890 à l'Esperanto en faveur duquel il crée des cours à Gand et à Bruxelles. En 1907 il devient adepte de l'Idiom Neutral et secrétaire du Groupe de la Langue Internationale fondé à Bruxelles par M. Bonto de Bijlevelt pour propager l'Idiom Neutral.

Adresse: J. Meysmans,
rue Mareyde, 11,
à Wohuwe près Bruxelles
(Belgique)

7 La plan-lingva revuo *Lingua Internationale* kaj ĝia enhavo

Reinhard Haupenthal

7.1 “Lingua Internationale”

La interlingvistika esploro karakteriziĝas i. a. per mult-nombro da plejofte efemeraj periodaĵoj, kiuj baldaŭ post la apero denove forgesiĝis kune kun sia enhavo.⁴ Ĉiam denove oni inventis la ovon de Kolumbo. Al ĉi revuoj apartenas i.a. ankaŭ la jena: *Lingua Internationale. Revue mensuelle consacrée à l'élaboration de la langue auxiliaire internationale*. Bruxelles 1. 1911/12: Nr. 1-12 (Mars 1911 – Février 1912).

La unuope paĝumitaj kajeroj (kun paĝo-nombro inter 8-20) ampleksas entute 180 paĝojn. La revuo kunfandiĝis kun *Revista Internationale. Organo ufficiale pro Propaganda de „Latino internationale“*. Ventimiglia 1911-1914 (Nr. 1-48), redaktita de *Ugo Basso*.⁵

Redaktoro de *Lingua Internationale* estis *Prof. Jules Meysmans* (1870-?), tiam aktivanta ĉe la Nacia Instituto por Stenografio en Bruselo⁶, kiu inventis la nocion „interlingvistiko“.⁷ Bedaŭrinde ĝis nun ne eltroveblis lia morto-dato.

Al la revuo kontribuis entute 17 laŭnome menciitaj aŭtoroj, kies plimulto nun-tempe forgesiĝis.⁸ La ĉi-sekva bibliografio registras iliajn kontribuojn.

7.2 La kontribuoj

[Anonima]

N-ro 3, p. 1-10: Responsiones de nostre lectores ad quaestione in discussione.

Same en: N-ro 4, p. 1-8; 5, p. 1-9; 6, p. 1-10; 7, p. 1-4; 8, p. 1-5; 9, p. 1-7; 10, p. 1-6; 11, p. 1-4. N-ro 8, p. 13-14: Un nouveau dictionnaire international.

Bibliographia N-ro 2, p. 20; 6. p. 16; 11, p.12.

BLONDEL, André: N-ro 2, p. 11-16: Constitution du Vocabulaire de la langue internationale.

BOND, Sidni E. (1872-?) N-ro 6, p. 15: Form de Vortes.

BONINGUE, A. M.: N-ro 2, p. 8-10: Aprobatione et critique. N-ro 4, p. 8-9: Finale i.

DELVAUX, E.: N-ro 3, p. 14-16: Pour l'Union. N-ro 5, p. 14-17: Le Principe du maximum d'Internationalité. div.: N-ro 11, p. 5-7: De accordo de adjectivo.

KOLOWRAT, Georg: N-ro 11, p. 8-11: Le vocabulaire de la langue internationale.

⁴ Kp. ekz. BLANKE 2011, HAUPENTHAL 2007 a, b.

⁵ Komplete de la gazeto ne troveblis ĝis nun.

⁶ Kp. HARTL 1911, lasta-tempe: *Biographie...*

⁷ Kp. MEYSMANS 1911/12.

⁸ Granda escepto restas Edgar von Wahl (1867-1948), la aŭtoro de *Occidental*.

Por komprenigi lian karieron utilis kunigi liajn dise aperintajn artikolojn en kolekto (aŭ almenaŭ en persona bibliografio).

LIMAL, A.: N-ro 5, p. 22-23: El vocal final del thema latin. N-ro 8, p. 8-10: De l'utopie à la science.

LUNDSTRÖM, Peter (= P. Friedmann?, ? – 1930): N-ro 6, p. 12-14: De articulo definito. N-ro 8, p. 11-13: Accordo de l' adjectivo cum el substantivo. (Nota del Editore: p. 13-15.) 3

[MEYSMANS, Jules]:

N-ro 1, p. 1-4: Notre Programme.

N-ro 1, p. 4-14: Projecto de lingua internationale, submisso ad discussione.

N-ro 2, p. 1-5: Discussione de nostre projecto de Lingua internationale.

N-ro 4, p. 16-19: La détermination scientifique du vocabulaire international.

N-ro 4, p. 19-22: Academia pro Interlingua.

N-ro 5, p. 10: De Articulo definito.

N-ro 8, p. 11-13: La nouvelle revue „FOLIO“.⁹

N-ro 8, p. 14-16: Une Science nouvelle.¹⁰

N-ro 12, p. 1-2: Notre fusion avec la Revista Universale

MICHAUX, Alfred (1859-1937): N-ro 8, p. 7-9: L'Orthographe etymologique. N-ro 12, p. 3-5: Les finales latines.

MONSEUR, Eugène (1869-1913): N-ro 7, p. 5-12: De l' article défini.

MOORE, Gerald: N-ro 1, p. 17-18: La Baso di l'Uneso en la L. I.

ORSATTI, Louis A.: N-ro 7, p. 7-8: Di Latin Finales.

PASCALE, Hector: N-ro 10, p. 7-10: Systeme de finales.

PEANO, Giuseppe (1858-1932): N-ro 4, p. 9-10: De Adverbio.

ROSENBERGER, Woldemar (1848-1918): N-ro 4, p. 11-13: Vocali final.

VANMALDER, J.: N-ro 5, p. 17-21: La chimère de la dérivation régulière.

WAHL, Edgar von (1867-1948):

N-ro 1, p. 15-17: L Principies de Interlingue.

N-ro 1, p. 19-20: L Leges de derivation en verbes. (Errata: N-ro 2, p. 5.)

N-ro 2, p. 6-7: Limites e potentie-sfere de logica en interlingue.

N-ro 2, p. 17-18: Nos relationes con „la Delegitaro“.

N-ro 2, p. 19: Substantives de abstraction.

N-ro 3, p. 11-13: L question de finales.

N-ro 4, p. 13-15: Nomes de scienties e artes, e de persones recupant se ye ili.

N-ro 5, p. 11-13: Geographic nomes.

N-ro 6, p. 10-12: L question de l articul.

N-ro 7, p. 13-14: L forme fundamental del paroles international.

N-ro 7, p. 14-16: El ver principie de internationalità.

N-ro 8, p. 6: Ancora li question de l articul.

N-ro 9, p. 9-11: Response a question en discussion.

⁹ Temas pri: *Folio*. Zeitschrift für allgemeine Sprachkenntnisse. Linz 1911-1913: Nr. 1-24. 216 S.

¹⁰ Vidu bibliografio...

N-ro 9, p. 15-16: Li principio fundamental.
N-ro 10, p. 11-12: Vocabules mort e vivant.
N-ro 12, p. 6-8: Responses a divers opinionos expresset en N-ro 1 de Lingua Internationale.

7.3 Bibliografio

Biographie von Jules Meysmans. En: *Interlinguistische Informationen*. 23. 2014: 91 (2), p. 5-7. (p. 7: Faksimilo de Curriculum vitae.)

BLANKE, Detlev (2011): *Planlingvistiko: eta sed riĉa revuo pri interlingvistiko*. En: Irmi kaj Reinhard Haupenthal (red.): *Instrui Dokumenti Organizi*. Fest-libro por la 80a naskiĝ-tago de Claude Gacond. 1931 – 20 aŭgusto – 2011. (Bad Bellingen): Edition Iltis, 292 p., p. 29-43.

HARTL, Alois (1911): Perfekt-Frühling. En: Alois Hartl, Hans Krenn, Josef Bernhaupt: *Die Anfänge der Perfect-Literatur. Gesammelte Aufsätze*. Linz: Zentraldr. 124 p. (Perfect-Literatur. N-ro 4.)

HAUPENTHAL, Reinhard (1976, Hrsg.): *Plansprachen. Beiträge zur Interlinguistik*. Darmstadt: Wissenschaftliche Buchgesellschaft VI, 365 p. (Wege der Forschung. 325.)

—(2007 a): „Revista Italiana di Esperanto“ – forgesita esperantologia revuo. En: *Informilo por Interlingvistoj*. 16. 2007: 61/62 (2/3), p. 30-31.

—(2007 b): „Revista Italiana di Esperanto“ – eine vergessene esperantologische Zeitschrift. En: *Interlinguistische Informationen*. 16. 2007: 62/73 (1/2), p. 33-34.

MEYSMANS, Jules (1911/12): Une science nouvelle. En: *Lingua Internationale* 1. 1911/12: 8. p. 14-16. – Germana trad. de Reinhard Haupenthal s. l. t. Eine neue Wissenschaft. En: HAUPENTHAL 1976, p. 111-112.

8 Intervjuo kun la Cifal Volapüka *Hermann Philipps*

Fine de 2013 la adeptoj de Volapuko elektis novan prezidanton, t.n. *Cifal*. La nova Cifal nun estas *s-ro Hermann Philipps* (HP) el Bonn/Germanio (li naskiĝis en 1945).

S-ro Philipps al mi donis afable intervjuon kaj respondis miajn demandojn la 29-an de majo 2014. La germana originalo aperis en „*Interlinguistische Informationen*“ 23(2014), n-ro 93, p. 34-37. Detlev Blanke (DB)

DB *Pri kiuj lingvoj vi tute ĝenerale okupiĝas?*

HP Pri ĝermanaj lingvoj, sed ankaŭ pri kelkaj konstruitaj lingvoj; dum mia junaĝo pri *Esperanto*, poste pri *Novial* (O. Jespersen), *Ido* kaj *Interlingua* (IALA), kaj foje dum tiu tempo – kaj nun denove – pri *Volapuko*.

DB *Ĉu por tiuj okupiĝoj ekzistas profesia fono?*

HP Jes. Antaŭ mia pensiuliĝo mi estis tradukisto por skandinaviaj lingvoj, la nederlanda kaj poste, ĉefe, pri la angla.

DB *Ĉu mi do rajtas demandi vin pri via profesio, via kleriĝo?*

HP Rilate al mia kleriĝo mi fakte estas diplomita ekonomo. Sed mia laboro post la studofino estis altgrade enua kaj malkontentiga.

Preskaŭ hazarde mi okupiĝis pri tradukado (angla-germana). Mi trovis profesion de tradukisto en norda Londono (5 jarojn). Post mia reveno al Germanio mi laboris kiel memstara tradukisto kaj – pli pro amuzo ol pro neceso – faris la diplomon de tradukisto en la Universitato de Darmstadt (ĉirkaŭ 1987).

DB *Ĉu krom pri Volapuko vi okupiĝas ankaŭ pri aliaj planlingvoj? Se jes, kiomgrade?*

HP Pri *Esperanto* mi okupiĝis nur dum mia junaĝo (komence de la 1969aj jaroj).

Nur eble en 1995 mi venis al *Volapuko*. Sed post kelkaj jaroj tio ne plu kaptis min.

Post tio mi trovis malnovan lernolibron de *Ido*. La lingvon mi preskaŭ dekomence bone komprenis, ĉar *Ido* konstrue sekvas Esperanton, ĝi al mi ŝajnas pli agrabla kaj pli bone trapensita. Mi ankaŭ reeldonis la lernolibron „*Ido für Arbeiter*“ (*Ido por laboristoj*).

(Vidu: <http://www.epubli.de/shop/autor/Hermann-Philipps/2718>).

Ankaŭ pri *Interlingua* (IALA) mi okupiĝis pli intense. Tiu lingvo al mi ŝajnas la plej bona solvo de internacia lingvo: Ĝi jam havas multe konatan leksikon kaj minimuman gramatikon. Sed la mondo ne volas okupiĝi pri ĝi.

DB *Ĉu vi sekvas la planlingvajn movadojn, ekz. en Interreto aŭ en la faka literaturo?*

HP De pli hazarde ĝis entute ne. Al neniuj planlingvoj mi donas iun ŝancon en la estonteco. Planlingvoj laŭ mi tamen estas intelekta defio por lingvo-amikoj. Esperanto, *Ido* kaj tre aparte *Volapuko* trudas al la lingva esprimado komplikaĵojn, kiuj neniam estus akceptitaj de la larĝaj popolaj amasoj, ne parolante pri la nevolo flanke de politiko kaj ekonomio..

DB *Kiujn motivojn vi konas, kiuj instigas nuntempajn planlingvulojn okupiĝi pri Volapuko?*

HP (1) La intelekta ĝuo okupiĝi pri tiu ĉi rimarkinda lingvo, kvazaŭ kiel lingvistika vitroperla ludo.

(2) La deziro konservi kiel kulturan herdaĵon kaj flegi tiun fenomenon, kreitan kun tiom da korsango, same kiel ekzemple kelkaj homoj okupiĝas pri la mezepoka germana aŭ la klasika greka. Foje oni argumentas, ke planlingvuloj atentu *Volapukon* pro ĝia avangarda rolo. Tio eble veras, sed ne interesas min.

DB *Kiu(j) motivo(j) gravas por Vi?*

HP La du ĵus menciitaj.

DB *Ĉu vi uzas la kasikan Volapukon de Schleyer aŭ la varianton de Arie de Jong aŭ alian?*

HP Ekzistas la imago, ke iam ekzistis klasika *Volapuko* de *Schleyer*. Sed fakte ankaŭ *Schleyer* mem ĉiam denove enkondukis ŝangojn en sian *Volapukon*.

Grandan parton de la ŝanĝklopodoj de *Schleyer* transprenis ankaŭ *Arie de Jong*, ĉefe post la falo de *Volapuko* ĉirkaŭ 1890. Sed li ankaŭ aldonis proprajn proponojn.

Same kiel *Ralph Midgley* kaj la eksa Cifal *Brian R. Bishop* ankaŭ mi uzas la *Volapukon*, kiel ĝin priskribis *Arie de Jong* en siaj aŭtoritata gramatiko de *Volapuko* ("*Gramat Volapüka*") kaj la granda vortaro *Deutsch-Volapük/Volapük-Deutsch* kaj en la nederlanda lernolibro "*Leerboek der Wereldtaal*". Aldoniĝas kelkaj centoj da tekstoj el la revuo "*Volapükagased pro Nedänapükans*", kiuj estiĝis ĉefe sub la influo de *Arie de Jong* kaj rigardeblas sufiĉe fidinda *Volapuko*.

DB Bonvolu mencii kelkajn ekzemplojn por la diferencoj inter la klasike kaj aktuale uzata Volapuko (se eble el leksiko, vortfarado, gramatiko kaj prononco).

HP La transiro inter „klasika“ kaj nuntempa Volapuko fakte estas flua. La diferenco nur tre videblas pro tio, ĉar la novigoj faritaj mem de J.M. Schleyer okazis ĉefe en la tempo post la falo de lia lingvo. Pro tio ili apenaŭ estas konataj kaj konatiĝis pli klare nur per la reformoj de Arie de Jong. Se temas pri la leksiko kelkaj kriptaj vortoj estis anstataŭigitaj per pli klaraj:

Pli malnova Volapuko

Moderna Volapuko

Flentän	Fransän	Francio
Nelij	Linglän	Anglio
lilädön (lil ,orelo’)	reidön	legi
ludog ("aĉa hundo")	lup	lupo
lömib	rein	pluvo

La plej rimarkeblaj ŝanĝoj en la vortfarado estas, ke en la moderna Volapuko ekzistas videble pli da radikoj. En la pli malnova Volapuko nocioj estis faritaj ofte nesisteme per afiksoj. La uzo de ankoraŭ multaj afiksoj estis sisteme unuecigita.

Esence la gramatiko restis konservita. Precipe frapas, ke la sufikso en la tria maskla persono, singularo kaj pluralo, en la moderna Volapuko estas uzata nur por vere masklaj estaĵoj. En la pli malnova Volapuko ĝi estis la kutima finaĵo ankaŭ por objektoj kaj abstraktaĵoj.

La prononco ekde Schleyer ne ŝanĝiĝis. Tamen la informoj ĉe Schleyer kaj Arie de Jong ne estas sufiĉe klaraj, ili estas problemaj. Aparte problema estas la pronoco de la siblaj fonemoj (voĉaj kaj senvoĉaj). Sed tio ne ludas rolon, ĉar ties prononco ne havas distingan signifon.

DB El kiuj lingvoj devenas la plej multaj radikoj en la nuntempa Volapuko?

HP Ili ĉefe venas el la angla, germana, franca kaj latina, tamen en forte reduktita kaj distordita formo..

DB Mi konas „Vög Volapük“. Ĉu ekzistas ankaŭ aliaj periodaĵoj?

HP Ne.

DB Ĉu vi aplikas Volapukon kiel parolatan lingvon? Ĉu ekzistas renkontiĝoj aŭ aliaj eblecoj por paroli Volapukon?

HP Malofte, kaj se tamen, tiam nur malfacile. Foje ĉe la telefono aŭ okaze de reciprokaj vizitoj, kaj ankaŭ tiam nur fragmente. Laŭ mia scio ne ekzistas parolantoj de Volapuko, kiuj flue regas la lingvon.

DB Ĉu parolata Volapuko ekzistas sur elektronikaj registriroj?

HP Jes, ili ekzistas. *Ralph Midgley* produktis KD-ojn kaj kasedojn kun de li legitaj volapukaj tekstoj. Kelkiom de ĝi ankaŭ troviĝas en la Volapuk-forumo ĉe Yahoo Groups.

DB Kiel oni determinas, kio estas „ĝusta“ aŭ “malĝusta” Volapuko? Kiu decidas tion? Ĉu persono aŭ institucio?

HP Ĝusta Volapuko devas sekvi la gramatikon kaj la vortaron de Arie de Jong. Se tio ne estas, tiam temas pri malĝusta Volapuko. Krom tio ekzistas Akademio de Volapuko ("Kadām Volapūka"), kiu kune kun la Cifal decidas pri la akcepto de novaj vortoj (ĉefe teknikaj). Sed la „Kadām“ ne estas tre aktiva.

DB Ĉu pere de la Interreto eblas lerni Volapukon?

HP Ĉe Facebook ekzistas grupo kun 150 anoj, el inter ili nur manpleno vere aktivas. Dum jaroj kaj ankaŭ nuntempe tre aktivas volapuka forumo ĉe Yahoo Groups. Krom tio ekzistas retejo en kaj pri Volapuko. Menciindas, ke en ambaŭ forumoj aperis kelkaj junuloj, kiuj esperigas, ke Volapuko pluekzistos, se ankaŭ nur en modesta kadro. Eblas diri, ke la Interreto ludas grandan rolon por Volapuko, ĉar ĉefe tie Volapuko ankoraŭ funkcias.

DB Ĉu ekzistas diskutrondo en la Interreto?

HP Vidu la lastan respondon. En ambaŭ forumoj (Facebook kaj Yahoo Groups) oni diskutas pri ĉio ebla, ĉefe en Volapuko, foje ankaŭ en la angla, sed ankaŭ ekzistas kelkaj enŝovaĵoj en Esperanto aŭ eĉ en la franca.

DB En kiuj landoj nuntempe troviĝas la plej multaj volapukistoj?

HP Jen estiĝas la demando, kiu estas volapukisto. Ĝenerale mi pensas, ke en Britio.

DB Kiel vi karakterizus la aktualan adeptaron de Volapuko (la lingvan komunumon de Volapuko)

HP La lingvo apenaŭ havas seriozajn adeptojn, sed estas pli vere kuriozaĵo, kun kiu kelkaj homoj dum certe tempo ludas kaj poste okupiĝos denove pri aliaj aferoj. Pro la strangaj vortformoj la lingvo ĝenerale ne estas vere facile lernebla.

DB Kion eblas diri pri konservado de la Volapukaj publikigaĵoj (libroj kaj revuoj) kaj rilataj arkivaĵoj?

HP Neniuj financaj rimedoj estas je la dispono. Apenaŭ iu ekzistas, kiu serioze kaj kontinue okupiĝas pri Volapuko kaj la konservo de la Volapuka materialo. Iom malnova literaturo troviĝas en la Esperanto-biblioteko de Vieno. Danke al la laboro de s-ro *Reinhard Haupenthal* multo troviĝas en la Bavara Ŝtata Biblioteko en Munkeno. Plua materialo troviĝas en kestoj en la *Butler Library* de Brita Esperanto-Asocio. Antaŭ kelkaj semajnoj iom da materialo estis sendita al mi el Britio de *Ralph Midgley* kaj *Brian R. Bishop*, por ke ĝi ne estu metata sur rubaĵejon. Pri la tuta problemo oni ankoraŭ devus pensi.

DB Kaj permesu aldonan demandon: Kiujn taskojn vi vidas kiel nova „Cifal“?

HP Ĉefe nuntempe temas pri tio, teni viva la intereson pri Volapuko kaj disponigi al interesatoj taŭgan lernmaterialon en kutimaj lingvoj, samtempe en la reto kaj kiel presaĵoj el online-eldonejo. Prilaborita lernolibro jam ekzistas en la online-eldonejo. Vidu: <http://www.epubli.de/shop/autor/Hermann-Philipps/2718>). Inter alie ankaŭ gramatiko de Arie de Jong devus aperi en la germana kaj angla. Ĝi ĝis nun ekzistas nur en Volapuko. Estas mia tasko antaŭenigi tiujn aferojn kaj certigi, ke ili realiĝu ĝisfine.

Detlev Blanke: S-ro Philipps, mi dankas vin pro la respondoj al miaj demandoj.

9 Ulrich Ammon pri la germana lingvo en la mondo

9.1 Pri la internacia pozicio de la germana

Prof. d-ro Ulrich Ammon (Universitato Duisburg/Germanio) en multaj libroj kaj studoj prilumis problemojn de la eŭropa lingvopolitiko, inter tio ankaŭ aparte la rolon de la germana lingvo en Eŭropo kaj en monda skalo. Li aparte priskribis i.a. la rolon de la germana kiel komunikilo en sciencoj.

Jam en la jaro 1991 ĉe De Gruyter (Berlin, New York) aperis lia enciklopedieca libro *Die internationale Stellung der deutschen Sprache* (633 p.) (la internacia pozicio de la germana lingvo), la ĝisnune fundamenta verko pri la temo.

Antaŭ nelonge aperis tute nove prilaborita verko, postsekvanta la supre cititan, kiu jam impresas pro sia ampleksego:

Ammon, Ulrich (2015): *Die Stellung der deutschen Sprache in der Welt*. Berlin-München-Boston: De Gruyter, 1295 S. . 79,95 EUR.

9.2 Pri la enhavo de la nova verkego

Ulrich Ammon (2015) prezentas la enhavon de sia libro en tre detala enhavtabelo (p.VII-X). Tiu tabelo kaj listoj de ilustraĵoj, mapoj, tabeloj, diagramoj kaj mallongigoj (p. XI-XII) kaj temindekso (p. 1275-1295) ebligas tre bonan orientiĝon pri la traktitaj temoj. Ammon utiligis kvantegon da fontoj, pri kiu atestas la ampleksa bibliografio (p. 1155-1273).

Ĉi-tie ne eblas prezenti la detalan enhavtabelon, sed ni almenu menciui la ĉefajn ĉapitrojn:

- A Die deutsche Sprache im Spannungsfeld nationaler Interessen und globaler Kommunikation: Begriffserklärungen und Theorieansätze (1-105).
(*La germana lingvo en la streĉo inter naciaj interesoj kaj monda komunikado: klarigo de nocioj kaj teoriaj aliroj*)
- B ‚Deutsche Sprache‘, ‚deutsches Sprachgebiet‘: Was dazu gehört und was nicht, und die Frage nach einer deutschen Ethnie (107-157).
(*‚Germana lingvo‘, ‚germanlingva regiono‘: Kio apartenas al tio, kaj kio ne; kaj la problemoj de germana etno*)
- C Sprecherzahl und ökonomische Stärke von Deutsch (159-197).
(*Nombro de parolantoj kaj ekonomia forto de la germana*)
- D Deutsch als staatliche Amtssprache (199-254).
(*La germana kiel oficiala ŝtata lingvo*)
- E Deutsch als Minderheitssprache, aber nicht staatliche Amtssprache (255-405).
(*La germana kiel minoritata lingvo, sed ne kiel oficiala ŝtata lingvo*)
- F Deutsch in der internationalen Wirtschaftskommunikation (407-518).
(*La germana en la internacia komunikado de ekonomio*)
- G Deutsch in der internationalen Wissenschaftskommunikation (519-698).
(*La germana en la internacia komunikado de sciencoj*)

- H Deutsch in der Diplomatie und in der Europäischen Union (EU) (699-832).
(*La germana en la diplomatio kaj Eŭropa Unio, EU*)
- I Die deutsche Sprache im internationalen Tourismus (833-868).
(*La germana en la internacia turismo*)
- J Deutsch in Medien und Sprachkunst außerhalb des deutschen Sprachgebiets (869-944).
(*La germana en la medioj kaj lingvo-arto ekstere de la lingvo-regiono*)
- K Deutsch als Fremdsprache (DaF) außerhalb des deutschen Amtssprachgebiets (945-1068).
(*La germana kiel fremdlingvo (DaF)¹¹ ekstere de la regiono kun la germana kiel oficiala lingvo*)
- L Politik der Förderung der deutschen Sprache in der Welt (1069-1154).
(*La politiko por progresigo de la germana lingvo en la mondo*)

La kompleta detala enhavtabelo ankaŭ troviĝas ĉe:

www.ulrichammon.de/resources/Stellung_der_deutschen_Sprache.pdf

9.3 Unu aŭ pluraj lingvoj de scienca komunikado?

Unu ĉapitro, sed ne nur tiu, meritas la apartan intereson de adeptoj de planlingvo.

En la ĉapitro *Avantaĝoj kaj malavantaĝoj de unu aŭ pluraj lingvoj de scienca komunikado* (p. 682-693) Ulrich Ammon diskutas kelkajn aspektojn de la internacia komunikado en sciencoj, kiun plurlingvismo aŭ unulingvismo povas malhelpi aŭ progresigi.

Ĉi-rilate li ankaŭ tuŝas projektojn de „artefarita globala Lingua franca (monda komunika lingvo)“ kaj mencias la proponon al la Ligo de Nacioj 1921 favore al la konsidero de Esperanto (683).

Post diskuto pri diversaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj de diversaj proponitaj modeloj por faciligi la internacian lingvan komunikadon, i.a. pasiva multlingveco („poliglota dialogo“ laŭ Posner), Ammon konstatas jene (691):

„Realigebla, justa kaj samtempe ekonomia solvo bezonus tute alian aliron – en la direkto de longe konataj vojoj: La internacia lingvo de scienca komunikado devus esti nenies gepatra lingvo. Por tio ekzistas du eblecoj:

- 1) Iu „morta“ lingvo, ne plu uzata, eble klasika lingvo, aŭ
- 2) lingvo nove kreita, „artefarita“, planlingvo

Nur tia fremdlingvo estus por ĉiuj vera Lingua franca.[...]

Ambaŭ proponoj ne estas novaj kaj kiel kandidatoj estis ofte menciitaj la latina (klasika lingvo) kaj Esperanto (planlingvo). Ĉiuj sciencistoj devus lerni la koncernan lingvon kaj povus limigi sin al ĝi en la internacia komunikado. Tiel estus certigitaj sama lerninvesto kaj justa disdivido de la ŝarĝoj (se oni ne konsiderus la malsamajn lernmalfacilojn surbaze de la malsama distanco al la eliraj lingvoj).“

Kvankam antaŭ 100 jaroj tia propono de planlingvo laŭ Ammon ŝajnis realigebla (vidu la raporton al la Ligo de Nacioj) ĝi nuntempe ne plu havas ŝancon. Ammon klarigas:

¹¹ DaF = germane ‚Deutsch als Fremdsprache‘ (la germana kiel fremdlingvo).

„Tamen la realigo de tia propono nuntempe ŝajnas neebla. Nur malgranda obstaklo verŝajne estus la antaŭjuĝoj kontraŭ „artefaritaj“ lingvoj, ekde longe incitataj de la kontraŭuloj[...] eĉ la politikaj kontraŭstaroj flanke de la anglasaksa mondo, kiu perdis sian lingvan avantaĝon, eble ne estus decidaj. Multe pli grandan bremsan efikon havus la intertempe realigitaj gigantaj investoj, donitaj al la lernado kaj uzado de la angla, malpli multe ankaŭ por aliaj „vivantaj“ fremdlingvoj.

Tiuj investoj estus perdiĝontaj. Sed ne nur tio. Ankaŭ milionoj da instruistoj kaj profesoroj por la angla kaj aliaj fremdlingvoj kaj tradukistoj kaj interpretistoj perdis sian ekzisto-bazon. Pro tio la transiro al tute alia, eble artefarita lingvo por la monda scienco aŭ eĉ por la tutmonda komunikado havus neantaŭvideblajn ekonomiajn sekvojn. Tia ŝanĝo ne estas atendebla en la nuntempo de daŭraj ekonomiaj krizoj“ (691-692).

Detlev Blanke

10 Revuoj

10.1 *A'dam Multiling* – Multilingualism and Amsterdam

Dum oktobro 2014 en la Universitato de Amsterdam oni fondis novan serion de fakaj artikoloj kun la nomo „*A'dam Multiling*“. Temas pri rezulto de kunlaboro inter du esplorcentroj de la universitato:

ACLIC (Amsterdam Center for Language and Communication) kaj ARTES (Amsterdam School for Regional, Transnational and European Studies):

<http://www.multilingualism.humanities.uva.nl>.

ACLIC estas reprezentata per prof. d-ro. Federico Gobbo, F.Gobbo@uva.nl

Por ARTES respondecas d-ro László Marác, L.K.Maracz@uva.nl

A'dam Multiling ekzistas nur online.

En la unua eldono aperis jenaj kontribuoj:

Federico Gobbo & László Marác: *An interdisciplinary working paper series on multilingualism.*

<http://www.multilingualism.humanities.uva.nl/wp-content/uploads/2014/09/a-dam-multiling-2014-1-1-nov-p1-5.pdf>

Humphrey Tonkin: *Planning the past in language planning:*

<http://ssrn.com/abstract=2514699>

Christopher Houtkamp: *Integrating language in theories on long-distance movement: migration vs mobility&the concept of motility:* <http://hdl.handle.net/11245/1.432944>

10.2 *Language Problems & Language Planning* vol. 38 (2014)- la enhavo

1/2014

Articles / Artículos / Aufsätze / Artikoloj

Maryam Borjian

„Language-education policies and international institutions: The World Bank’s vs. UNESCO’s global framework”

Conchúr Ó Giollagáin

„Unfirm ground: A re-assessment of language policy in Ireland since Independence”

Assel Akzhigitova and Sholpan Zharkynbekova

„Language planning in Kazakhstan: The case of ergonyms as another scene of linguistic landscape of Astana”

Interlinguistics / Interlingüística / Interlinguistik / Interlingvistiko

Chris Krägeloh and Tia N. Neha

“Lexical expansion and terminological planning in indigenous and planned languages: Comparisons between Te Reo Māori and Esperanto”

Reviews / Críticas / Rezensionen / Recenzoj

Reviewed by Federico Gobbo

Albert Bastardas-Boada. *Language and identity policies in the ‘glocal’ age: New processes, effect, and principles of organization.*

Reviewed by Federico Gobbo

Wera Blanke. *Pri terminologia laboro en Esperanto: Elektitaj publikaĵoj.*

Recensione di Renato Corsetti

Maria Luisa Villa. *L’inglese non basta: Una lingua per la società.*

Reviewed by Frank Nuessel

F. Xavier Vila (Ed.). *Survival and development of language communities: Prospects and challenges.*

2/2014

Articles / Artículos / Aufsätze / Artikoloj

Conchúr Ó Giollagáin

„From revivalist to undertaker: New developments in official policies and attitudes to Ireland’s ‘First Language’ „

Rubén Fernández Asensio

„Language policies in the Kingdom of Hawai‘i: Reassessing linguisticism”

Juan R. Valdez

„La regimentación lingüística en un escenario transnacional: La República Dominicana / Haití

Andy Hancock

„Language education policy in multilingual Scotland: Opportunities, imbalances and debates”

M. Obaidul Hamid and Richard B. Baldauf, Jr. †

„Public-private domain distinction as an aspect of LPP frameworks: A case study of Bangladesh”

Reviews / Críticas / Rezensionen / Recenzoj

Rezensiert von Till-Dietrich Dahlenburg

Věra Barandovská-Frank (Ed.). *Littera scripta manet: Serta in honorem Helmar Frank.*

Reviewed by Jukka Pietiläinen
D. V. Vlasov. *Эсперанто: полвека цензуры*

Reviewed by Humphrey Tonkin
Bernard Spolsky (ed.). *The Cambridge handbook of language policy.*

3/2014

Articles / Artículos / Aufsätze / Artikoloj

Kateřina Āern

„Status des /sterreichischen Deutsch: Sprachenrecht und seine Auswirkungen“

Anna Kristina Hultgren and Jacob Thgersen

„Englishization of Nordic universities: Policy and practice — A disconnect“

Hacer Hande Uysal

„English language spread in academia: Macro-level state policies and micro-level practices of scholarly publishing in Turkey“

Interlinguistics / Interlingustica / Interlinguistik / Interlingvistiko

Frederico Gobbo

„Interlinguistics and Esperanto studies at universities: The experience at the University of Turin“

Reviews / Crticas / Rezensionen / Recenzoj

Rezensioniert von Lszl Marcz

Jakob Haselhuber. *Mehrsprachigkeit in der Europischen Union: Eine Analyse der EU-Sprachenpolitik, mit besonderem Fokus auf Deutschland*

La enhav-tabeloj de ĉiuj ĝis nun aperintaj kajeroj de LPLP troveblas ĉe:

<https://benjamins.com/#catalog/journals/lplp/issues>

11 Bibliografioj

11.1 La lingvoj de la mondo: *Glottolog.org*

En kajero 4/2014 de la germanlingva revuo *MaxPlanckForschung* oni legas sur p. 9:

„La eldonejo De Gruyter disponigas al la datumbazo *Glottolog* ĉiujn bibliografiajn datumojn el sia lingvistika programo. Tiu ĉi datumbazo, subtenata de la germana „Max-Planck-Gesellschaft“ ofertas liberan aliron al sciencaj informoj pri la lingvoj de la mondo. la unua transdono de datumoj kun ĉirkaŭ 4000 libroj kaj 5000 revuoj pli malpli finiĝis. Post tio ankaŭ ĉiuj aliaj estontaj titoloj eniĝos la datumbazon.“

Se oni aliras <http://glottolog.org/>, oni trovos jenajn (nur) anglalingvajn klarigojn:

Welcome to Glottolog

Comprehensive reference information for the world's languages, especially the lesser known languages.

Information about the different languages, dialects, and families of the world ('languoids') is available in the [Languages](#) and [Families](#) sections. The [References](#) section contains bibliographical information. You can query the bibliographical database by filtering the table view or using [a complex query](#) involving genealogical affiliation, document type, and macro-area.

Catalogue of languages and families

Glottolog provides a [comprehensive catalogue](#) of the world's languages, language families and dialects. It assigns a unique and stable identifier (the Glottocode) to (in principle) all languoids, i.e. all families, languages, and dialects. Any variety that a linguist works on should eventually get its own entry. The languoids are organized via a genealogical classification (the Glottolog tree) that is based on available historical-comparative research (see also the [Languoids information](#) section).

Bibliography

The [References](#) section ('langdoc') provides a comprehensive collection of bibliographical data for the world's lesser known languages. It provides access to more than 180,000 references of descriptive works such as grammars, dictionaries, word lists, texts etc. Search criteria include author, year, title, country, and genealogical affiliation. References can be downloaded as txt, bib, html, or with the [Zotero](#) Firefox plugin.

Propono por serĉoj:

Languages

Sub 'Languages' oni trovas ĉiujn lingvojn registritajn en la datumbanko, inter ili ankaŭ Esperanto kaj Interlingua.

References

Sub 'References' oni povas serĉi laŭ aŭtoroj (Name) aŭ temoj (Title).

Tie oni trovas ĉe 'Name' nomojn de kelkaj interlingvistoj kaj ĉe 'Title' multajn rezultojn ekz. ĉe 'Interlinguistik', 'interlinguistics', 'Plansprachen', 'planned languages', 'Esperanto' ktp.

11.2 Aktuala Bibliografio 6

Hrsg. = redaktis aŭ editis.

Ammon, Ulrich (2014): *Die Stellung der deutschen Sprache in der Welt*. Berlin: De Gruyter, 1295 p.

Astori, Davide (2014, Hrsg.): *La Premio „G. Canuto“ por magistriĝa disertacio pri Interlingvistiko kaj Esperantologio*. Milano: Itala Esperanto-Federacio, 223 p. (artikoloj de/pri Giorgio Canuto, kaj i.a. pri lingvopolitikaj, sciencorganizaj kaj alitemaj kontribuoj).

Belošević, Marija (2013, Hrsg.): *Zbornik “Mali jezici - bogato književno stvaralaštvo”*. *Almanako “Minoraj lingvoj – riĉa literatura kreado”*. Zagreb: Hrvatski esperantski savez/ Kroata Esperantista Unuiĝo, 171 p.

Blanke, Detlev (2015): *Eugen Wüster – la planlingvoj kaj la Enciklopedia Vortaro*. Berlin: D. Blanke, bindita manuskripto, 104 p. (ricevebla ĉe detlev@blanke-info.de, 10 EUR + sendokostoj).

Brosch, Cyril (2015): Seksa egaligo en la lingvo – laŭfundamente.→
<http://lingvakritiko.com/2015/01/31/seksa-egaligo-en-la-lingvo-laufundamente>

Duličenko, Aleksandr D. (2007): *Istorija interlingvistiki*. Moskva: Vysšaja škola, 183 p.

Fernández, Miguel (2014, Red.): *Memorindaj anarkiistoj kaj anarkiisma esperantismo*. Madrid: Asociación Izquierda y Esperanto - SATeH, 153 p.

Fiedler, Sabine (2015): Gender in a planned language: Esperanto.→Hellinger, Marlis/Motschenbacher, Heiko (2015, Hrsg.): *Gender Across Language*. Vol. 4. Amsterdam: Benjamins, p. 97-123.

Gobbo, Federico (2014): Interlinguistics and Esperanto studies at universities. The experience at the University of Turin. →*Language Problems & Language Planning* (38), Nr. 3:292-303.

Hauptenthal, Reinhard (2014): *Laudationes in honorem Gaston Waringhien (1901-1991), André Albault (1923-), Adolf Burkhardt (1929-2004), Claude Gacond (1931-)*. Germanaj versioj. Bad Bellingen: Edition Iltis, 42 p. (kun fotoj).

—(2014): *Einblicke. Rezensionen zur Esperantologie und Interlinguistik*. Herausgegeben von Hervé Vallon. Bad Bellingen. Edition Iltis, 119 p. (germanlingvaj recenzoj).

—(2014): *Personalbibliographie. Persona bibliografio. Juan Régulo Pérez (1914-1993)*. Bad Bellingen. Edition Iltis, 23 p.

Jansen, Wim (2015): Leksikografia dilemo en Esperanto: ĉu baska, eŭska aŭ vaska?→*Beletra Almanako* 22: 94-99

Keefe, Dennis (2015): Pedagogio estas por infanoj. Andragogio estas por plenkreskuloj. →*Internacia Pedagogia Revuo* 45 (2015), n-ro 1, 9-16.

Korĵenkov, Aleksander (2015): Zamenhof kaj la movado.→*La Ondo de Esperanto* 1/2015: 16-17.

Košťálek, Jindřich (2015): Komenio kaj Zamenhof – konciza komparo de iliaj planlingvoj. →*Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft (grkg)* 56, 1:44-52.

Koutny, Ilona (2014): A nemzetközi és kulturaközi kommunikáció alternatívái az EU-ban.→Ladányi, Mária/Vladár, Zsuzsa /Hrenek, Éva (Red.): *Nyelv – Társadalom – Kultúra I-II*. Budapest: Manye – Tinta Könyvkiadó, 243-250

—(2014): Kompozicionalitás és lexikalizálódás egy tervezett nyelv esetében. (Compositionality and lexicalization in the case of a planned language).→(Havas, Ferenc / Horváth, Katalin / Kugler, Nóra / Vladár, Zsuzsa Red.): *Nyelvben a világ. Tanulmányok Ladányi Mária tiszteletére*. Budapest: Tinta Kiadó, 144-151. (festlibro por Maria Ladányi).

Korĵenkov, Aleksander (2015): La “nova energio” de Carlo Bourlet.→*La Ondo de Esperanto* 3/2015: 14-15.

—(2015): Generalo Sebert – sindona kaj nelacigebla.→*La Ondo de Esperanto*, 4-5/2015, p. 16-17

*Krause, Bernd (2014a): „Ehre ihrem Andenken!“ Gefallene deutsche Esperantisten des Ersten Weltkriegs.→*Genealogie. Deutsche Zeitschrift für Familienkunde* 32.2014 (63. Jg.), S. 282-293 (pri esperantistoj falintaj dum la Unua Mondmilito)

*Krause, Bernd (2014b): „Nova grupo estas fondita.“ Dokumente aus den ersten Jahren der Esperanto-Bewegung in Kronach.→*Archiv für Geschichte von Oberfranken* 94.2014, S. 205-220

Kuhn, Hans-Dieter (2010): Die Plansprache Volapük in Konstanz.→*Hegau. Zeitschrift für Geschichte, Volkskunde und Naturgeschichte des Gebietes zwischen Rhein, Donau und Bodensee*. Singen/Hohentwiel 67 (2010), S. 201-228.

Lapenna, Ivo (2014): *Esploro kaj Dokumentado. Redaktita kaj korektita represo de artikoloj el la rubriko “Esploro kaj Dokumentado”, aperintaj en la revuo “Horizonto” (1976-1987)*. Đurđevac (Kroatio): Grafokom, 221 p.

Lindstedt, Jouko (2010): Esperanto as a family language.→Fred Dervin (ed.), *Lingua francae. La véhicularité linguistique pour vivre, travailler et étudier*. Paris: L’Harmattan, p. 69-80.

Lins, Ulrich (2015): Herdaĵo kaj novkomenco. Historiistoj malkovras Esperanton.→*La Gazeto* 30 (2015), n-ro 175: 20-21. (ankaŭ vidu IpI 91: 28-29).

—(2015): Danoj eskapis persekuton. Pri la observemo de Gestapo/SS kaj la spitemo de esperantistoj.→*Beletra Almanako* 22:65-73.

Maat, Jaap (2014): Natural languages and artificial language. Leibniz’s rational grammar as the link between the two.→Li, Wanchao (2014, Hrsg.): *Einheit der Vernunft und Vielfalt der Sprachen. Beiträge zur Leibniz’ Sprachforschung und Zeichentheorie*. Stuttgart: Franz Steiner (437 p.) p. 43-54.

Mayer, Herbert (2000): Plansprachen und Sprachutopien.→Petschar, Hans (Hrsg.), *Alpha und Omega. Geschichten vom Ende und Anfang der Welt*. Wien: Springer, (349 S.), p. 218-225.

Pennacchietti, Fabrizio A. / Minnaja, Carlo (2014): „Littera scripta manet – Helmar Frank inter revo kaj realo“.→*Literatura Foiro* 45(2014), n-ro 272: 288-293.

Pokrovskij, Sergio (2015): Ĉu jes aŭ ne?→*La Ondo de Esperanto*, 4-5/2015:12-15.

Rátkai, Árpád (2015): Informfalsantoj kontraŭ Lazar Markoviĉ Zamenhof.→*Beletra Almanako* 22:57-64.

Rider, Robin E. (1990): Measure of Ideas, Rule of Language: Mathematics and Language in the 18th Century.→Tore Frängsmyr/J.L. Heilbron/ Robin E. Rider (1990, eds.): *The Quantifying spirit in the 18th century*. Uppsala Studies In History of Sciences 7 (Berkely, Los Angeles, Oxford: University of California Press, p.113-140. (VIII+411 p.)

Rossi, Paolo (1971): Aspetti della rivoluzione scientifica. Kapitel VII: Lingue artificiali, classificazioni, nomenclature.→Pietro Piovani (Hrsg.) *Colana di Filosofia XIII*. Neapel: Morano (424 p.), p. 293-367.

Szilva, Szabolcs (2015): Diversaj aliroj al la klasifikado de planlingvoj.→*Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft (grkg)* 56, 1:21-40.

Tonkin, Humphrey (2014): Planning the past in language planning. → *A'dam Multiling* (2014)1:1, Nov, 6-15.

<http://www.multilingualism.humanities.uva.nl/download/a-dam-multiling-2014/> (8.2.2015)

Vallon, Hervé (2015, Ed.): *Reinhard Haupenthal. Bibliographie seiner Veröffentlichungen zur Esperantologie und Interlinguistik. Zum 70. Geburtstag von Reinhard Haupenthal am 17. Februar 2015*. Bad Bellingen: Edition Iltis, 157 p. (Foto)

Wüster, Eugen (2015): *Enciklopedia Vortaro Esperanta – Germana. Transskribita de Hans-Joachim Plehn. Kvina liverparto. Korno – luzulo*. Berlin: D. Blanke, bindita manuskripto 114 p. (ricevebla ĉe detlev@blanke-info.de, 10 EUR + sendokostoj).

*Pri pliaj publikigaĵoj de *Bernd Krause* (esperanto@geschichtswissenschaften.com) vidu: <http://independent.academia.edu/BerndKrause>.

11.3 Leksika materialo *Glosbe*

Inter la pluraj interretaj datumbazoj vortaraj, *Glosbe* // <https://glosbe.com/> probable nuntempe estas la plej ampleksa. Jen informcele, kion mi notis por Berlina Komentita Bibliografio de Vortaroj kaj Terminaroj de Esperanto (BKB):

(se la mesaĝprogramo fuŝas la tekston, simple mem iom "ludu" laŭ la supra ret-adreso).

„*Glosbe*“ (<https://glosbe.com/>) estas vortara datumbazo interreta kun sidejo en Pollando kun ĉ. 2000 (!) font- kaj cellingvoj, inter kiuj ankaŭ estas Esperanto. Sub unueca fasado (komence de 2015 eblas ŝalti inter ĉ. 65 fasadaj lingvoj: angla, franca, germana k.a., Esperanto ne jam) oni povas elekti iujn ajn traduk-kombinojn, ekz. Esperanto → Navajo, ksosa, zulu aŭ Ido, manksa, joruba → Esperanto k.t.p.

La rezulto varias de simpla unuvorta traduko, al aldonaj dulingvaj ekzemplofrazoj, unu- aŭ dulingvaj difinoj, bildoj, referencoj al similaj vortoj el la sama semantika kampo, prononc-indikoj laŭ IPA aŭ sondosieroj pri la elparolo, indiko pri silabo-disigo k.t.p. Se rekta, unuŝtupa traduko ne eblas, la sistemo resendas proponojn laŭ haveblaj duŝtupaj tradukoj, markitaj per averto pri duŝtupeco. En tre ĝenerala maniero „aŭtoroj“ aŭ „fontoj“ estas indikitaj, ekz. „Wiktionary“, „Wikipedia“, „OmegaWiki“, „Tatoeba“, „FreeDict“, la vortaroj de la serio „La Vortaro“, Reta Vortaro k.t.p.

La nomitaj apartenas al la por Esperanto pli gravaj fontoj. Krome enestas vortara materialo de pluraj universitatoj, ekz. multlingva vortaro de loknomoj *HeiNER* (enhavas Esperanton), verkita de la universitato Heidelberg. La sistemo-administrantoj aŭ libervolaj helpantoj (necesas registriĝo kaj ensaluto) daŭre serĉas kaj enigis iun ajn taŭgajn vortarajn materialojn sen kopirajto, ekz. troveblajn en Interreto aŭ simple novajn traduk-parojn aŭ aliajn vortarajn elementojn (ŝanĝoj estas menciitaj en listo „Nunaj aktivecoj“).

(Lau informo de *Bernhard Pabst*, 05.02.2015)

11.4 Bildvortaro de Eichholz en la reto

Ekde 2012 la Bildvortaro de Rüdiger Eichholz (1922-2000) troviĝas kiel skanaĵo en la reto (50 MB): // <http://www.pdf-archive.com/2012/02/05/esperanta-bildvortaro-rudiger-eichholz/>

Eichholz, Rüdiger [red.]:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/R%C3%BCdiger_Eichholz>]. Esperanto-bildvortaro.

Bailieboro (Ont./Kanado): Esperanto Press, 1988. 880 p. 368 ilus. — 20 x 13 cm. ISBN 0-919186-32-7. Siglo: EB. Laŭtema bildvortaro kun ĉ. 25.000 kapvortoj surbaze de la 2a germana eld. de *Bilderwörterbuch* (Duden) 1958 (1a 1935).

2a korektita eldono, Bailieboro (Ont./Kanado): Esperanto Press, 1989. 880 p. 368 ilus. — 20 x 13 cm. Preskaŭ identa kun la 1a eld. 1988, korektitaj nur terminoj 225/62 kaj 212/64.

Reproduktaĵo 2012 de la 1a eldono 1988 kiel netraserĉebla bild-pdf (50,3 mb, 2012-02-02), rete <<http://www.pdf-archive.com/2012/02/05/esperanta-bildvortaro-rudiger-eichholz/>> elŝutebla.

Recenzoj

— 1988: N.i.: Jen la bildvortaro kiu klarigas la tutan mondon. [Pri Eichholz, R. Esperanta Bildvortaro. Bailieboro 1988]. En: *Monato* 1988:09:06, p. 25.

—1988-1990: *Farjon de Lagatinerie, Jacques-Franky*: Post dudekkvarjara gravedeco... En: *Akademiaj Studoj*. Bailieboro, Ont. Vol. 1988-1990. p. 334-340.

—1988-1990: *Krause, Erich-Dieter*: Grandioza verko por la praktika esperantisto. En: *Akademiaj Studoj*. Bailieboro, Ont. Vol. 1988-1990. p. 333.

— 1991: *Vaitilavičius, Adomas*: La bovuno kornobatas Esperanton, se la prezidantuno ne defendos ... En: *Litova Stelo* 1991/2 (78), p.16-18: Kontraŭ -un kaj -uk, proponitaj en EB. Kontraŭ -j por ŝtatnomoj.

— 1994: *Pabst, Bernhard*: Bildvortaro premiita. Nova eldono preparata. En: *Esperanto Aktuell* 1994/8, p. 5: IEK atribuis OSIEK-premion 1994 al Esperanta Bildvortaro; Eichholz planas novan eldonon kaj alvokas al kunlaboro. Mallongigita versio en *Terminoteko* 1995:5:1 (11), p. 23-25.

— 1994: *Zilah, Eugène De*. En: *Gazeto* 1994:9:5.

— 1995: *Pabst, Bernhard*: Ĉu vi jam scias pri vortaroj, ke ... [Pri planita, tamen ne aperinta nova eldono de EB]. En: *Gazeto* 56 (31-Jan-1995), p. 31: Noto pri la preparlaboroj por nova eldono de la Bildvortaro (EB2), alvoko al kunlaboro.

(Lau informoj de *Bernhard Pabst*)

12 Materialoj de GDREA ĉe SAPMO

Antaŭ 50 jaroj fondiĝis “Centra Laborrondo Esperanto en Germana Kulturligo”, la antaŭulo de la posta “*Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR*” (GDREA). Tio okazis precize la 31-an de marto 1965. Pro tio povus leviĝi la demando, kie aperis aŭ malaperis la biblioteko kaj la arkivaĵoj de la asocio? Nu, ili saviĝis. Ili estas alireblaj por esploremuloj ĉe SAPMO. Kion signifas la kripta mallongigo SAPMO?

12.1 SAPMO – parto de la ŝtata Germana Federacia Arkivo

Post la germana unuiĝo la germana ŝtato kreis la „Fondaĵon Arkivo de Partioj kaj Amasorganizaĵoj de GDR en la Federacia Arkivo“ kun la germana mallongigo SAPMO („*Stiftung Archiv der Parteien und Massen-Organisationen der DDR im Bundesarchiv*“).

La celo de SAPMO estas transpreni, daŭre konservi, uzebligi kaj kompletigi la arkivaĵojn de la partioj kaj amasorganizaĵoj kaj juraj personaĵoj de GDR. SAPMO ankaŭ konservas aliajn materialojn kaj bibliotekojn pri la germana historio. La Fondaĵo eklaboris la 3.1. 1993.

(<https://www.bundesarchiv.de/bundesarchiv/organisation/sapmo/index.html>)

La adreso: Finckensteinallee 63, 12205 Berlin.

12.2 La aktoj de *Kulturligo de GDR* kaj de *GDREA* en SAPMO

En SAPMO troviĝas ĉiuj aktoj de **Kulturligo de GDR** kun siaj multaj (preskau 60) diversfakaj sekcioj, societoj, subsekcioj kaj intereso-societoj.

(→http://de.wikipedia.org/wiki/Kulturbund_der_DDR)

Tio ankaŭ koncernas la aktojn de la Sekcio Esperanto / de la **Esperanto-Asocio (GDREA)**, 1965 – 1991.

(→<http://www.bundesarchiv.de/fachinformationen/01207/index.html.de>).

La konsisto de la materialo estas konsultebla en **registra libro** :

(→http://www.bundesarchiv.de/findbuecher/sapmo/b_esperanto/index.htm)

Ankaŭ eblas konsulti la katalogon de la **biblioteko de GDREA** :

(→http://www.bundesarchiv.de/findbuecher/sapmo/b_esperanto/index.htm)

12.3 La kolekto *Blanke*: Arkivo kaj Biblioteko

La 11-an de aŭgusto 2005 *Wera* kaj *Detlev Blanke* subskribis kontrakton kun SAPMO pri la transdono de sia kompleta faka kolekto (interlingvistiko kaj esperantologio – biblioteko kaj arkivo) kiel *postlasaĵo*. Tamen ankaŭ dum la vivo-tempo familio Blanke povas transdoni partojn de la kolekto („*antaŭlasaĵo*“). Ĝi tion faras. Ĝis 10.05.2015 al SAPMO jam estas transdonitaj diversaj materialoj. Ili estas je la dispono de interesatoj kaj konsulteblaj en la legejo (oni menciis „kolekto Blanke“).

La materialoj troviĝas en du sekcioj: *arkivo* kaj *biblioteko*.

a) La arkivo

La jam transdonitaj arkivaĵoj estas registritaj ĉe:

<http://www.argus.bstu.bundesarchiv.de/ny4604/index.htm>

b) La biblioteko

En la **biblioteko de SAPMO** troviĝas multaj materialoj ankaŭ pri Esperanto (Jen trovoj por 06.04.2015: *Esperanto* 200, *Interlinguistik* 10, *Wera Blanke* 88 (kune kun D. Blanke), *Detlev Blanke* 117 (kune kun W. Blanke). Tie ankaŭ troviĝas multaj revuoj jam transdonitaj:

<http://www.bundesarchiv.de/bibliothek/F?RN=928801513>

Por pli da informoj pri la transdonitaj materialoj vidu www.blanke-interlinguistik.de (nova retejo, ekfunkcionta dum somero).

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org. ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 6 33, fakso:+ 49-30-54 98 16 38, detlev@blanke-info.de. Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ KD. Artikoloj sen aparta indiko pri aŭtoreco kutime estas kompilitaj de la redaktoro. Represo kun fontindiko estas permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Oni ĉefe bibliografias viditajn materialojn. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj bonvenaj. IpI riceveblas laŭpete senpage de CO de UEA .
